Tiuj ideoj, por esti pravigitaj, bezonas la alfrontadon je la socia kaj kultura kunteksto aktualaj. Se ne ekzistas tia alfrontado interna, tio estas, la konstato pri la kohereco de la internaj ideoj kun la realaj intereso de la personoj, malmulte oni povos atingi. Post kiam establiĝe tiu ordigo je ideoj (komparebla kun la establado je entreprena filozofio) estus grave kunveni pri la aktualaj celoj de la asocioj per realema maniero, tio estas, malpreterante ĉiujn erojn partoprenantajn je ilia funkciado. Tio estus kiel pretigi la maŝinaron.

Se la nordo estas oferti Esperanton kiel “merkatan produkton”, la publiko komprenos ĝin kiel simplan akademian aŭ turisman rimedon, kun tre



La sengraveco de esperanto en la universitato Katterin Gutiérrez

malmulta povo je la lasta funkcio. Sed estas necese demandiĝi, ĉu Esperanto estas nur akademia ilo? Ĉu la esenca celo de Esperanto estas taŭgi kiel akademia rimedo? Se la respondo jesas, la t.n. “esperantista komunumo” tute malhavus sencon —ĉar propedeŭtikaj funkcioj akademias ne bezonas komunumon kiu ilin reprezentu ideologie— aŭ, pli malbone, ĝi kompareblus kun komunumo de “sursofaj filozofoj”, kiuj nur produktas vortojn sen la plej eta kontakto kun la socia realo; do, la socia realo ankaŭ ne interesiĝas pri ili.

La alvoko al la studenta loĝantaro ende ŝprucu laŭ iniciatoj kulturagaj, kvankam ties ago-kampo enhavos multajn areojn, kiel tion faras la patrino de ĉiuj sciencoj: filozofio. Fine, la iniciatoj kiuj venus el tiaj ideoj funkcios kiel reklamado mem, tio estas, la iniciatoj memaj estos la alvoko al la studenta loĝantaro por la diversaj agadoj.

La kultura agado antaŭpostulas koheran kosmovidon, sed ŝajne ĉi difino je kosmovido propre “esperantista” estas io ne ŝatata de la tradiciaj esperantistoj: La memdifino esperantista estas preskaŭ tabuo, aŭ ĝi vidatas kiel nura rimedo en la ebleco gajni pli da membroj; sed kion postulas la realo estas ĝuste la malo: la memdifino estu la koro de la movado, ĉio alia estas nur “konsekvenco”.

Tial mia intereso en la Asocio konformiĝas pleje kun la nova projekto filozofia kaj kultura kiu estas naskate, Sona Sewi: iniciato kiu povus aldoni la filozofian kadron kiun tiom oni malpermesis al esperantismo. Sen tiu kompreno, Esperanto daŭros inter universitatoj komparata kun vortenigmoj de revuoj aŭ kun utopio de ia minoritata grupo, sen ebleco por materiigo aŭ transcendeo. ★

Opinio de Dennis Keefe rilate al tiu artikolo

Mi dankas pro viaj pensoj rilate Esperanton kaj ĝian disvastigon kaj ĝian lernadon. La unua parto de la artikolo estis relative facile legebla, sed la formato ŝanĝiĝis subite meze, metante 30 vortojn sur unu linio, kio ege malfaciligis la legadon. Tio tute ne estas via kulpo.

Unu parto de via rezonado tuŝas la kialon por lerni Esperanton. Tie eble estus bone plilarĝigi la diskutadon pri kial iu entute lernas lingvon, kaj poste kial iu entute lernas ion ajn. Krome indas distingi inter infanoj kaj plenkreskuloj.

Infanoj devas iri al lernejo. Ili devas lerni tion kion oni montras al ili. Plenkreskuloj, aliflanke, estas multe pli liberaj. Ili povas elekti iun ajn temon. Por meti Esperanton en lernejo, depende de la lando, povas esti tre tre komplika kaj kelkfoje nebla afero. Starigi kurson de Esperanto por plenkreskuloj, tio povas esti, lau la loko, tre facile.

Estas multe da manieroj analizi pri kial iu lernas ion, sed fundamenta bazo de tio estas la laboro de Cyril Houle ĉe la Universitato de Chikago antaŭ 50 jaroj. Laŭ Houle, estas:

1 Plenkreskuloj kiuj lernas por atingi iun celon: gajni pli da mono, lerni vivi pli sane, instrui pri kiel havi pli feliĉan vivon, ktp. Tia lernado estas praktika. Tia lernado tuŝas Esperanton nur rande (laboropostenoj ĉe UEA, internacia laboro ĉe Ĉielismo en Ĉinio, ktp.)

2 Plenkreskuloj kiuj lernas por sociaj kialoj. Tiaj homoj volas esti kun aliaj homoj, amikiĝi, ne resti sole hejme, ktp. Ne tiom gravas ĉu la kurso estas pri astronomio, aŭ pri matematiko aŭ pri Esperanto. Tia lernado sufiĉe oftas en Esperantujo. Tamen ofte tiaj homoj restas eternaj komencantoj.

3 Plenkreskuloj kiuj lernas ĉar ili ŝatas lerni. Ili studos kaj studos kaj studos dum la tuta vivo, ne ĉar ili volas esti kun aliaj homoj, ne ĉar ili volas vivi pli bone, sed ĉar ili scivolos, ĉiam scivolos. Estas kelkaj el tiaj homoj en Esperantujo. Mi estas unu el ili.

La klasifikado de Houle estas simpla; aliaj klasifikaj sistemoj kiel tiu de Boshier, estas eble pli trafaj. Viaj ideoj ankaŭ estas tre bonaj.

Ĉi tie ne estas bona loko por pridiskuti tiun valoran temon. Libera Folio, aŭ Ondo de Esperanto, aŭ ILEI, ktp. Se ia tia interdiskutado okazos tie, mi volonte priatentos. Sed ne ĉi tie, ĉar legante la ekranon tro dolorigas al mi.

Amike,
Dennis Keefe

LA 31-a INTERNACIA FESTIVALO EN JÜLICH 27.12.2014 - 3.1.2015

Raportas: Liba kaj Floreal Gabaldi

Kadra temo: Novaj energioj

La ĉi-jara Internacia Festivalo estis vere la lasta. Enskribiĝis 106 personoj el 18 landoj. Tamen kelkaj ne povis ĉeesti pro diversaj kialoj. Sed aperis novuloj, kiuj bedaŭris ne malkovri la IF-on pli frue. Dum la tuta semajno regis familia etoso, en kiu ĉiuj ĝoje amuziĝis post la vespera programo en la "Knajpo".

La program-oferto, kiel ĉiam estis bunta, aperis kelkaj kromaj programeroj. Ĉiu povis elekti laŭ sia plaĉo. Kun bedaŭro ni konstatis la forpason de Rémy Bouchet al kiu ni omaĝis per kelkaj vortoj kaj rememoroj en la Interkona vespero.


La vetero favoris nin kaj instigis al pluraj promenadoj en la urbo kaj en la apuda parko. La novkonstruita IF-ejo laŭ hoteleca stilo estas tre komforta kaj ĝi plaĉis al ĉiuj. En la manĝejo ni mem priservis nin kaj la manĝo estis bongusta.

Al la kadra temo kontribuis ĉefe Alfred Schubert per prelegoj pri "Energi-ŝanĝiĝo en Germanio" kaj "Vetveturado per elektraj aŭtomobiloj". Krom tio okazis jam la 8-an fojon IVU-prelegoj (Internacia Vintra Universitato) agnoskitaj kiel AIS sesioj. Okazis ekzamenoj kaj en la Adiaŭa vespero oni disdonis atestilojn al la sukcesintoj. Kadre de IVU Amri Wandel prelegis pri "La scienca revolucio de Einstein - 2015 centjara jubileo de la Teorio de Relativeco" kaj pri "Vivo sur foraj planedoj - la revolucio de la spac-teleskopo Kepler". En iu sennuba vespero ni havis okazon spekti la ĉielon kaj Lunon per malgranda teleskopo kun klarigoj de Amri. Dieter Kleemann prelegis pri "Romkatolika misia agado en Japanio kaj la sekvoj por la socia strukturo kaj politiko en la lando". Mikaelo Bronŝtejn parolis pri "La monda E-literaturo: enspezo de Rusio". Krome li prelegis pri "Rusio kaj Ukrainio, la du ŝtatoj - ĉu frataj?", klarigante ĉefe la historion de Ukrainio.

Same kiel en aliaj IF-oj ni povis ekscii pri la rusa eldonejo Impeto kaj Anna Striganova rakontis pri fabelaj mondoj kaj montris siajn pupkreaĵojn. En aliaj prelegoj ni ekscii pri "Vegana vivo el propra sperto" de Klaus Friese. Harald Schicke parolis pri "Alia

alirmaniero al malsanoj". Aŭtoran horon pri siaj libroj havis Nora Caragea. La profesia ĵurnalista Alfred Schubert informis pri la funkciado de gazetara sistemo. Lia prelego titoliĝis "Efike kunlabori kun ĵurnalistoj" kaj krome li instruis nin kiel bone foti. Andr• Weber malkovris kaj diskutis pri siaj spertoj rilataj al malgrandaj gajnoj: "Sukcesetoj per akcioj kaj fondusoj". Li ankaŭ gvidis posttagmezan ekskurseton al elfosejoj en la regiono de Hambach kaj al biogas-produktejo. Dieter Rooke animis lecionon pri didaktiko. Pri ĝemelaj urboj interesiĝas kaj klarigojn pri ili donis Pieter Engwirda. Prelego de Ian Fantom titoliĝis: "La Kaiser, Titanic kaj la Unua Mondmilito". Karl Breuninger parolis pri sia eksterordinara rilato kun Rusio kaj Sovetio dokumentita per multaj bildoj.


Matene oni povis ekzerci "Tai-chi-chuan" kun Barbara Poterucha kaj poste malstreĉiĝi per dancgimnastiko kun Vera Vlasova. Kelkaj partoprenantoj ankaŭ plurfoje profitis saŭnadon. Dum la kafopaŭzoj ĉiuj vigle babilis aŭ rigardis fotoalbumojn de Liba Gabalda pri ĉiuj IF-oj, kiujn ŝi kun Floreal ĉeestis. Ili ankaŭ projekciis filmon pri rememoroj el diversaj IF-oj. Entute ili partoprenis 23-foje. Tiom plaĉaj la festivaloj estis. Ankaŭ Brian Moon prezentis lastjaran IF-on en retrospektivo. Liba organizis la dancvesperon laŭ la latinamerika muziko, ne mankis ŝiaj hejmfaritaj kuketoj. Bone funkciis la libroservo prizorgita de Paul Peeraets kaj Jean Luc Thibias.

Oni spektis kelkajn bildprezentojn pri diversaj vojaĝoj fare de niaj partoprenantoj. Barbara Muhlemann prezentis kaj parolis pri sia vojaĝo en Argentino okaze de la 99-a UK, Amri Wandel vizitis kaj rakontis pri siaj vojaĝspertoj en Hindio, Liba kaj Floreal montris filmon pri Nepalo de Roman Dobrzyński. En marto ili partoprenis la Specialan Renkontiĝon organizitan de nepalanoj kaj poste ili kune vizitis la orientan parton de la lando. 

LA 31-a INTERNACIA FESTIVALO EN JÜLICH 27.12.2014 - 3.1.2015 Liba kaj Floreal Gabalda



Novaj partoprenantoj



Anna Striganova



Latva vespero



Dancvespero



Rusa vespero



Natasa Bertse




Alfred Schubert



Alia ligarto al maseno

Harald Schicke



Vegana vivo el propra sperto

Klaus Frieso 11/2014



Amri pri Hindio



Floreal Gabalda



La scianta revolucio de Einstein: Teorio de Relativo 1905-1915

Amel Wandel - Liba, 80-jaroldato La 31-a IF Jülich 2014/15



Barbara pri Argentino



Kolonjo



31a IF Jülich



Dieter Kleemann



Adiaŭa vespero



Internacia vespero



Gila Wandel



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

1a Venezuela Kongreso de Esperanto fareblus en Merido

Preparoj komenciĝis fare de venezuelaj esperantistoj por realigi la **1-an Venezuelan Kongreson de Esperanto**. La evento estus planita por realigi la venontan jaron en la venezuela okcidenta urbo **Merido** (Mérida). Jen ni prezentas al vi kelkajn fotojn de la urbo kaj kelkajn proponitajn grafikaĵojn por la kongreso.



Placo Bolívar

Ĉefpreĝejo de la urbo



Placo Mérida




1a Venezuela Kongreso de Esperanto fareblus en Merido



Glaciaĵo-vendejo Coromoto, tre fama pro siaj glaciaĵoj el nekutimaj saporoj: viando, pizoj, fiŝoj...



1a Venezuela Kongreso de Esperanto fareblus en Merido



Fotoj de la urba muzeo



Propono por la kongreso (loka Merida E-grupo)



Emblemo por la kongreso. Ĉi tiu emblemo montras figuron de loka montara floro nomita *frailejón* kun la verda stelo en ties centro.



Afiŝo kaj emblemoj (maldekstre) proponitaj de Ramón Morales Castel



Reformoj kaj plibonigoj: la detruiloj de nia lingvo

Ramón Morales Castel

Tre ofte oni trovas, ke reformistoj kaj “plibonigantoj” de la lingvo apogas siajn elpensitaĵojn sur la argumento de supozebla logiko. Mi ofte tamen trovas, ke kelkaj logikaj analizoj estas fakte eraraj. Mi do certe ne klopodas konvinki la plibonigantojn, ĉar ili “scias ĉion”, ili “komprenas ĉion”. Tion laŭvorte respondis al mi certa iĉisto. Mi do ne skribas por ĉiosciantoj, ĉar ne eblas interŝanĝo de opinioj kaj argumentoj kun iu homo, kiu jam lernis ĉion en la vivo. Mi skribas por homoj raciaj, kiuj estas malfermitaj al aliaj ideoj kaj opinioj, al novaj konoj. Kaj eĉ mi mem, kiu ne estas ĉioscianto, povas erari ĉi tie. Tial mi do akceptos ankaŭ respondojn kaj kontraŭargumentojn rilate ĉi temon.

Kial esti puristo kaj bremsi la evoluon de la Lingvo Internacia? Ĉar **unue** nia lingvo naskiĝis jam evoluigita kaj sekve ne bezonas evolui tiom, kiom la etnaj naciaj lingvoj. **Due**, ĉar tia evoluo devas okazi rigore kaj plej strikte regata de vera logiko kaj racieco. Tio signifas, ke se oni diras “la morfemoj **ut** kaj **unt** estas logikaj”, oni do rajtas kaj endas pridubi tion plej forte kaj plej obstine ol oni farus en la etnaj naciaj lingvoj, se io simila okazus. Jen en tiuj lingvoj purismo estas eble ia “retroirigilo” aŭ artifika bremsilo, ĉar tiaj lingvoj ja kripetas pluevoluigon... Sed Esperanto ne estas tia. **Purismo en nia lingvo estas la konduto, kiu certigas la unuecon kaj plidaŭrecon de nia bela lingvo.** Kaj **trie**: ĉar Esperanto jam havis sufiĉe da evoluado dum la lastaj jardekoj. Certe la lingvo tia, kia oni trovas ĝin por ekzemplo en Nova PIV, estas evoluinta formo kompare de la lingvo origina de Zamenhof kaj la pioniroj. Oni do certu, ke ĉi tiu grado de evoluado sufiĉas por plua longa tempo. Estas saĝe scii, kiam oni haltu, almenaŭ dum momento. Kaj “momento” en la vivo de la lingvoj signifas jardekojn.

Ĉu vi volas detruiri la Lingvon Internacian? Trudu kaj lernigu reformojn kaj plibonigojn. Tiuj detruos la unuecon de la lingvo, kaŭzinte ties finfinan mortigan malfortecon. Tiele, anstataŭ fari bonon al nia lingvo, la “plibonigantoj” fakte estas detruantaj ĝin. Eble ili lernis nenion de la ĉina lingvo. Aŭ ĉu mi diru “ĉinaj dialektoj”? Ĉinoj de la ĉefurbo de sia lando devas traduki siajn televidprogramojn por esti komprenitaj de la sudaj ĉinoj, ĉar tiuj lastaj fakte parolas alian dialekton de la ĉina lingvo. Jen lingvo dividita de dialektoj. Jen nacio, kiu bezonas traduki al si mem.

Reformistoj ankaŭ lernis nenion de la hispana lingvo. Ni havas Akademion de la Lingvo, kiu ege penas ĉiujardeke por reguli la neracian nelogikan kaj



tre foje frenezan kreivecon de la hispanlingva parolantaro. Sen tia regulado de barbarismoj, idiotismoj, neologismoj kaj neraciaj elpensitaĵoj, la parolantoj de la hispana lingvo estus jam diserigitaj pere de dialektoj tute miskomprenigaj inter si. Tiuj, kiuj laboras en la Akademio de la Lingvo Hispana, kaj tiuj, kiuj valoras tiun laboron, komprenas la gravecon de la regulado de “reformoj” kaj plibonigoj, ĉar danke de tia regulado tra jardekoj la relativa unueco de la hispana lingvo ebligas, ke ĝi estu la dua plej parolata lingvo de la mondo, poste de la ĉinaj dialektoj.

Zamenhof kaj la pioniroj konsciis pri la danĝereco de dialektoj: Esperanto certe detruigis se ni dialektigas ĝin. Kion okazos, se oni ekuzas kelkajn neoficialajn elementojn? Sufiĉos nur du “reformoj” por detruie dialektigi Esperanton. Skribu verkon akceptante kiel normalajn la monemojn **ut** kaj **unt**, kaj la sufikson **iĉ**. Nur tiuj tri elementoj, kiuj ŝajnas tute senkulpaj kaj nedomaĝaj, sufiĉos por krei dialekton de nia lingvo. Homoj lernintaj tian dialekton miskomprenos ĉion, kio estas skribita kaj parolita en nia nuna evoluigita kaj jam evoluinta Esperanto. Tio signifas, ke oni necesos “traduki”, reverki ĉiujn niajn librojn, niajn kursojn, romanojn, teatraĵojn, ĉiujn materialojn de la Lingvo Internacia, en la novan dialekton por esti legata kaj komprenata de ties parolantaro. Kaj jen la unueco de Esperanto estos finfine detruita. La iĉisto, kiu diris al mi, ke li *komprenas kaj scias ĉion*, certe ne pripensis la konsekvencojn de tiuj supozeblaj plibonigoj.

Mi tute ne hontas pri kromnomoj: nomu min dogmulo, retroulo, “kvadratkapulo”... Ne gravas. Mi nur pensas pri la unueco de Esperanto, ĉar tiu unueco estas ties fortikeco. Estas fiere por mi legi tekstojn de Zamenhof kaj povi kompreni ilin. Estas ĝue legi la verkojn de la pioniroj, verkojn de la lasta jardeko de la deknaŭa jarcento, kaj verkojn de la unuaj jardekoj de la dudeka jarcento, kaj povi kompreni ilin. Estas esperdone povi diri al la komencantoj kaj interesatoj de Esperanto: Vi povos kompreni librojn kaj paroladojn kaj kantojn de la pasinteco! Vi parolos lingvon unuecan kaj fortikan, kiun Zamenhof mem parolis! Tia sperto plibonas kaj pligravas ol revoj de evoluigo kaj ŝajnsukcesaj plibonigoj. ★

Ĉu morfemoj **ut** kaj **unt** estas tiel logikaj, kiel oni diras?

Ramón Morales Castel

Ŝajne la ĉefa argumento favore al la uzo de la barbarismaj monemoj **ut** kaj **unt** estas ties logikeco. En la artikolo pri untismo de la Esperanta Vikipedio oni trovas multe tiun argumenton:

“Untismo estas nenorma praktiko aldoni la kondicionalajn participojn -unt kaj -ut al Esperanto. Tio estas la logika kompletigo de la oficiala participsistemo...”

Mi ne povas ne demandi: ĉu tiel logikaj? ĉu tia kompletigo? Mi opinias, ke Zamenhof donis al la participaj morfemoj la vokalojn de la tri tempoj indikativaj, ĉar li intuciis, ke participoj devenas nature de verbo-formoj kun difinita tempo, kaj nur la modo indikativo temas pri tiaj verbo-formoj.

En mia klasifiko de verbaj morfemoj de Esperanto mi vidas unue du grupojn de verbo-formoj: 1) verbo-formoj de difinita tempo, kaj 2) verbo-formoj de nedifinita tempo. En grupo 1 troviĝas indikativo, en grupo 2 troviĝas la modo de nedifinita tempo, nome infinitivo, volitivo kaj kondicionalo. Por mi, tia estas la plej simpla kaj racia klasifiko de verbo-formoj en nia lingvo. Kaj participoj devenas ekzakte kaj nure de la modo indikativo. Per tio mi volas aserti, ke, almenaŭ laŭ mia vidpunkto, participoj devenantaj de la aliaj modoj ne estas raciaj, ne estas logikaj:

VERBO-FORMOJ DE DIFINITA TEMPO	VERBO-FORMOJ DE NEDIFINITA TEMPO
it, int ← -is	-i PARTICIPOJ DE NEDIFINITA TEMPO NE ESTAS RACIAJ
at, ant ← -as	-u
ot, ont ← -os	-us
PARTICIPOJ RILATAS NUR AL DIFINITA TEMPO	

Tio estas kompreneble temo de diskuto kaj esploro fare de specialistoj, ĉar miascie oni kutime ne rigardis participojn kiel verbo-formojn devenintajn de specifa verba modo. Tia rigardo ŝajne estas propra de nia lingvo. Kio ja certas, estas tio, ke en untismo oni ja devenigas la morfemojn **ut** kaj **unt** de certa verba modo, la kondicionalo... Kaj tio igas aperi alian pli danĝeran rimarkon: la participoj **ut** kaj **unt** ne kompletigas la participsistemon, ĉar se oni povas devenigi participon de kondicionalo, oni ankaŭ devas devenigi participojn ekde la infinitivo kaj la volitivo. La tiel nomata kompletigo pri kiu asertas untismo estas

tiam ja pridubinda. Tiel la defio de la defendantoj de untismo estas esplori kaj klarigi kial oni ne povis ankoraŭ devenigi participajn morfemojn ekde la infinitivo kaj ekde la volitivo sed jes ekde la kondicionalo. Ĉu la esenca traito de tiuj tri modoj (nedifiniteco de tempo) kaŝas aliajn pli gravajn trajtojn? Aŭ ĉu temas nur simple pri tio, ke tiuj strangaj participoj ne eblas ĉar ili estas neraciaj nocioj? Do, se vi defendas untismon, aŭ se vi havas amikon untisman, sciu ke la supozebla kompletigo ne estas vera kaj la supozebla logikeco de **ut** kaj **unt** estas ja dubinda:

NERACIAJ PARTICIPOJ (ĈAR DEVENAS DE VERBO-FORMOJ DE NEDIFINITA TEMPO)

-i → **...?, ...?**
-u → **...?, ...?**
-us → **ut, unt**

La neracieco de **ut** kaj **unt** igas min pensi, ke tiaj barbarismaj morfemoj ne estas fakte participaj morfemoj. Ili estas morfemoj samspecaj kun aliaj verbrilataj morfemoj, ekzemple kun **ebl**, **end** kaj **iv**. Morfemoj **ut** kaj **unt** servas por esprimi kompakte certajn ideojn. Povinte esprimi tiujn ideojn per tiuj morfemoj, la defendantoj de untismo kredis, ke ili estas fakte participaj morfemoj. Temas do pri memtrompo.

La funkciecon de tiuj morfemoj ankaŭ plifortigis la fakto, ke oni povas traduki al esperanto kompakte certajn sintagmojn de aliaj lingvoj per ili. Oni tradukis de la angla la sintagmon "*wannabe student*" per la barbarismo **studunto**, kaj tio donis la ideon, ke oni fakte kreis participon. Same okazis pri la sintagmo "*my would-be girlfriend*", kiu tradukiĝis per la barbarisma **mia estunta fianĉino**. Tiu sintagmo estas pli mallonga ol la norma "tiu, kiu estus mia fianĉino". Ĉi tie mi demandas al mi mem, kial la esprimo "mia us-fianĉino" kiel rekta traduko de "*my would-be girlfriend*" ne aperis aŭ ne populariĝis. Ĝi estas tiom norma kaj logika kiel niaj vortoj as-tempo, is-tempo, os-tempo, a-vorto, o-vorto, kaj cetere. Pri la sintagmo "*wannabe student*": mi tradukus ĝin rekte per "volas-esti-studento", kio ne estas tre kutima procedo en esperanto sed iel komprenebla.

Ajnajne, mi ne ŝatas tiujn **ut** kaj **unt**. Ili ne aldonas ion belan kaj necesan al nia lingvo, sekve por mi ili estas nuraj lingvaj distraĵoj. La dubindeco de ties logikeco kaj la neracieco de ties deveno konvinkis min, ke ili estas forĵetindaj, domaĝaj por nia lingvo. ★



Edgar Rice Burroughs: Princino de Marso



Supra ilustraĵo: Frank Frazetta.

“ Miaj okuloj vidis sveltan, knabinecan hominon, ĉiel similan al la teraj virinoj de mia pasinta vivo. Unue ŝi ne vidis min, sed en la momento antaŭ ol ŝi trairis la pordon de la konstruaĵo destinita por sia malliberejo, ŝi turnis sin, kaj ŝiaj okuloj renkontis miajn. Ŝia vizaĝo estis ovala, kaj tre, tre bela; ĉiu ĝia trajto estis delikata, la okuloj estis grandaj kaj brilaj, kaj sur ŝia kapo estis amaso da nigraj, bukraj haroj. Ŝia haŭto estis la koloro de pala kupro, kaj kontraste kun ĝi brilis la karmezino de ŝiaj vangoj kaj la rubeno de ŝiaj belformaj lipoj.

”

El la libro *Princino de Marso*, de *Edgar Rice Burroughs*, paĝoj 65-66. INKO, El la angla tradukis K.R.C. Sturmer.

La e-libro de INKO libere elŝuteblas ĉe **Bretaro.net**:
<http://www.bretaro.net/verkoj/183-princo-de-marso>



Directorio de Asociaciones en América

El Movimiento Esperantista (la *Movado*) es muy amplio y diverso. En todo el mundo hay una variedad de clubes, organizaciones, asociaciones, editoriales, institutos, etc, dedicados a la difusión y el uso del idioma internacional Esperanto. En este directorio te mostramos las páginas oficiales de las principales asociaciones de Esperanto en América. Presta especial atención a las páginas y recursos de asociaciones en países de habla hispana, puesto que podrás aprovechar tu lengua materna (el español), para aprender Esperanto o para participar en los eventos y encuentros en todo el continente.

CANADÁ

Esperanto en Canadá: <http://www.esperanto.ca/>

Esperanto-Societo Kebekia: <http://www.esperanto.qc.ca/eo>

Boletín *La Riverego*: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego>

ESTADOS UNIDOS DE NORTEAMÉRICA

Esperanto-USA: <http://www.esperanto-usa.org/>

Usona Esperantisto, boletín de Esperanto-USA:

<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

Sociedad Esperantista de Washington: <http://www.esperantodc.net/>

Sociedad Esperantista de New York: <http://www.esperanto-nyc.org/>

Esperantic Studies Foundation: <http://esperantic.org/en/>

Editorial *Mondial*: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

CUBA

Asociación Cubana de Esperanto: <http://www.esperanto.cult.cu/>

Radio Havano Kubo: <http://www.radiohc.cu/eo/>

MÉXICO

Federación Mexicana de Esperanto:
<http://esperanto-mexico.org/>

Revista *Ni ĉiuj*:

<http://esperanto-mexico.org/es/nicxiuj>

Asociación Mexicana de Esperanto:

http://meksikoesperanto.org/el_esperanto_en_mexico.html

COLOMBIA

Liga Colombiana de Esperanto:
<http://www.oocities.org/kolombio/>

Kolombia Esperanto-Ligo:

<http://esperantokalio.blogspot.com/>

VENEZUELA

Asociación Venezolana de Esperanto:
<http://www.esperanto-venezuela.org/>

BRASIL

Brazila Esperanto-Ligo: <http://esperanto.org.br/bel/>

Brazila Esperantista Junulara Organizo: <http://bejo.esperanto.org.br/>

Esperanto @ Brazilo (portugués): <http://esperanto.brazilo.org/wp2/>

Esperanto Ilustrado (portugués):
<http://www.esperantoilustrado.blogspot.com.br/>

Esperanto Ilustrita (esperanto):
<http://www.esperantoilustrita.blogspot.com.br/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo: <http://easp.org.br/portal/>

URUGUAY

Urugvaja Esperanto-Societo: <http://www.esperanto.org.uy/>

CHILE

Asociación Chilena de Esperanto:
<http://esperanto.cl/>

Juventud Esperantista Chilena:

<http://chejo.blogspot.com/>

ARGENTINA

Liga Argentina de Esperanto: <http://www.esperanto.org.ar/>

Blog de la Liga: <http://argentinaesperantoligo.blogspot.com.ar/>

Bonaera Esperanto-Asocio: <http://esperanto-bea.blogspot.com/>



Esperanto: Movimiento Internacional

El Movimiento Esperantista es un movimiento verdaderamente internacional, multicultural, que reúne en un solo esfuerzo muchas culturas, pueblos y naciones, sin discriminación de razas, idiomas, religiones o inclinaciones políticas. Esperanto significa idioma pero también significa cultura internacional, derechos humanos, democracia y justicia social. Todas las asociaciones y hablantes del idioma internacional tienen un centro común, la Asociación Universal de Esperanto, que organiza, entre otras cosas, los Congresos Universales de Esperanto que se llevan a cabo en una ciudad del mundo una vez cada año.

ASOCIACIÓN UNIVERSAL DE ESPERANTO y otras organizaciones esperantistas

Asociación Universal de Esperanto (UEA):
<http://www.uea.org/info/hispana.html>

UEA en Facebook:
<https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

Centro multilingüe sobre el Esperanto: <http://esperanto.net/>

Unión Europea de Esperanto: <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Liga Internacional de Pedagogos Esperantistas:
<http://www.ilei-mondo.info/page.php?pid=65657697>

edukado.net: <http://edukado.net/>

Academia Internacional de las Ciencias San Marino:
<http://www.ais-sanmarino.org/index.html>

Asociación Mundial Anacional: <http://www.satesperanto.org/>

Academia de Esperanto: <http://www.akademio-de-esperanto.org/>

Periódicos y revistas en línea

Revista *Kontakto* (revista juvenil): <http://kontakto.tejo.org/>

Eŭropa Bulteno (Boletín de *Eŭropa Esperanto-Unio*):
<http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/>

La Ondo de Esperanto y editorial *Sezonoj*: <http://esperanto.org/Ondo/>

La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Le Monde diplomatique: <http://eo.mondediplo.com/>

La Esperanto-centro EVENTOJ: <http://www.eventoj.hu/>

La Esperanta Gazetejo: <http://www.gazetejo.org/gazetejo>

Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn/>

El Popola Ĉinio (Desde la China del Pueblo):
<http://esperanto.china.org.cn/EL/EL/EIPopolaCxinio/>

Monato (actualidad, noticias y opinión): <http://monato.esperanto.be/>

Usona Esperantisto (Esperantista estadounidense):
<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

En España

Federación Española de Esperanto:
<http://www.esperanto.es/hef/>

Hispana Esperantista Junulara Societo:
<http://www.esperanto.es/hef/index.php/hejs>

Asociación Catalana de Esperanto:
<http://www.esperanto.cat/web/?lang=ca>

Kataluna Esperanto-Junularo: <http://esperanto.cat/kej/ca>

Kataluna Esperantisto (revista):
<http://www.esperanto.cat/web/Kataluna-Esperantisto?lang=ca>

Arunda Esperanto-klubo:
<http://esperantoarunda.blogspot.com/p/eventos-eventoj.html>

Asociación Andaluza de Esperanto:
<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/>

Radios y podcasts

Radio Vatikana (Ciudad Vaticano):
<http://www.radiovaticana.va/esp/index.asp>

Radio Havano Kubo (Cuba): <http://www.radiohc.cu/eo/>

Muzaiko (Internacional): <http://muzaiko.info/>

Peranto (Alemania): <http://members.aon.at/aldone/retradio/>

Pola retradio (Polonia): <http://pola-retradio.org/>

3ZZZ Radio en Esperanto (Australia):
<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

Varsovia Vento (Polonia): <http://www.podkasto.net/>

Editoriales

Eldonejo Impeto: <http://impeto.trovu.com/>

Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

Flandra Esperanto-Ligo: <http://www.esperanto.be/fel/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Eldona Esperanto-Societo: <http://www.algonet.se/~eldona/>

KAVA-PECH: <http://www.kava-pech.cz/index-esperanto.html>

Libros de la serie *Stafeto* de Juan Régulo Pérez:
<http://www.esperanto.be/fel/but/stafeto.php>

Por qué el esperanto...



Ricardo Coutinho, edad 35, cajero y supervisor, estado Miranda. Supe de la existencia del esperanto desde mi infancia, gracias a que mi hermano mayor compró la colección del Libro Gordo de Petete, allí estaba una pequeña reseña que decía que el esperanto era una lengua planificada, creada por un oftalmólogo y lingüista polaco, Luis Lázaró Zamenhof, su objetivo fue que todos los hombres de distintas razas se conocieran a través de este idioma, y que el mismo no tuvo éxito. Cuando ingresé en la Escuela de Historia de la Universidad Central de Venezuela conocí a un compañero de estudio llamado Fernando Castillo, el había recibido un curso en la Asociación Venezolana de Esperanto, yo le pedí que me llevara a dicha organización pero nunca se llegó a concretar ese viaje. Pero algunos meses después leí en la revista Todo en Domingo (año: 2000) un artículo donde aparecía los teléfonos de la asociación. Para esa época ya se había comprado la sede, por cierto muy cerca de mi casa de estudios. De allí participo en nuestra organización. He sido: oficinista, vocal de biblioteca, secretario, actualmente presidente y redactor de nuestra revista, Venezuela Stelo.



Andrea Araque de Santiago, 26 años, Administradora de empresas, Mérida.

Conocí el esperanto mientras cursaba mi carrera universitaria, mi mejor amigo de clases, ahora mi esposo, lo había descubierto en internet y ya tenía tiempo aprendiendo, siempre me hablaba del esperanto y un día decidimos comenzar un curso en el que él sería mi profesor. Así que todos los mediodías antes de las clases de la tarde, estábamos en la plaza de la facultad aprendiendo este hermoso idioma cuya sencillez me atrajo desde el principio.

Hoy día usamos el esperanto a diario, hemos hecho amigos en nuestro país y en distintas partes del mundo, esperanto estas nia lingvo internacia.



Isaac Santiago, edad: 27, profesión: contador público, como conocí el esperanto: el Esperanto lo descubrí por casualidad en Internet en el 2007, me encontraba en un artículo de Wikipedia donde salía una lista de idiomas y justo debajo del español (en orden alfabético) estaba el Esperanto, rápidamente investigué de qué se trataba, conseguí un curso por internet pero no fue sino hasta Enero del 2008 que comencé a aprenderlo de manera autodidacta, al principio solo por curiosidad pero poco a poco me iba dando cuenta de lo grande que es el mundo del Esperanto. Durante toda la vida he estudiado inglés y también he estudiado otros idiomas incluso antes de aprender el Esperanto, actualmente el Esperanto es el idioma que más me ha servido para conocer a personas de otros países y culturas.



VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.
Telefonnumero: 58 0212 6629224.
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net

